

四人の妻

Kvar Edzinoj

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

釈尊の説法に、ひとつの譬え話があります。つぎのようなお話です。

昔、あるところに四人の妻を持つ男がいました。

彼は第一夫人をととても愛していました。毎日化粧をさせ、寒いにつけ暑いにつけ彼女をいたわり、欲しいものを買ひ与え、行きたいと言うところには連れて行き、食べたいものは何でも食べさせ、寵愛していました。

また第二夫人は美人の誉れ高く、浮気をされないようにいつも気かけ、外出の時は常に連れ出し、家に帰ってから鍵のかかる部屋に入れ、勝手に出て行かぬように見張りまでしました。

第三夫人には毎日会うわけではありませんでしたが、会えば気持ちが通じ合い、互いに喜びあうのが常でした。

しかし第四夫人はといえば、まるで使用人のよう。毎日忙しく働き夫の世話をしているにも関わらず、罵られたり無視されたりしています。夫は第四夫人のことはまるで眼中になかったのです。

ある時、この男は遠い国へ行かねばならないことになりました。そこで第

Ŝakja-munio prezentis alegorion:

Iam vivis viro, kiu havis kvar edzinojn.

Li tre amis la unuan edzinon, ĉiutage ŝminkis ŝin, zorgis pri ŝi en malvarma kaj varma tempo, donis al ŝi ĉion ajn, kondukis ŝin ĉien ajn, kaj donis al ŝi ĉiajn ajn manĝaĵojn, kiel ŝi deziris. Tiel li amis ŝin elkore.

La dua edzino estis fame konata pro sia beleco. Tial la viro zorgis pri ŝi, por ke ŝi ne rilatu al alia viro. Kiam li estis ekster hejmo, ŝi devis akompani lin, kaj kiam li estis hejme, li enfermis ŝin en ŝlositan ĉambron, por ke ŝi ne forlasi hejmon laŭvole.

Li renkontis la trian edzinon ne ĉiutage. Sed kiam li vidis ŝin, iliaj sentoj harmoniiĝis kaj ambaŭ ĝojis.

Sed la kvara edzino estis kvazaŭ servistino. Ĉiutage ŝi laboris kaj zorgis por sia edzo. Spite tion la viro foje insultis aŭ ignoris ŝin, do tute ne havis intereson pri ŝi.

Venis la tempo, kiam la viro devas iri al malproksima lando. Li petis de la unua edzino akompani lin. Ŝi ploris larmojn, sed rifuzis lian peton, dirante,

一夫人に、「一緒に行ってくれ」と頼みました。すると第一夫人は涙を流し、「あなたには色々お世話になり大切にいただきました。でもそんなに遠い国へ行くのは嫌です」と、断られてしまいました。

しかたなく、今度は第二夫人に同行を頼みました。すると第二夫人は、「あなたの最愛の第一夫人がお断りになったものを、第二夫人の私ができるわけはありません」と、あっさり断られました。

男はがっかりして、第三夫人のもとへ出かけました。第三夫人は「それでは国境までお見送りいたしましょう。でもそこまでにしてください」と、やはりついてきてはくれないようです。

男は途方に暮れて、第四夫人にも同じように言ってみました。すると第四夫人は「親元を離れてあなたに嫁いで以来、常にあなたと一緒にです。だから、どこまででもお供します」と答えました。それを聞いて男は、深い後悔の念におそわれました。こんなに自分を思っていてくれる相手をもっと大切にすべきだった、と。

ここで釈尊は尋ねられます。「この男とはだれのことであるか。遠い国とはどこか。また第一・第二・第三・第四夫人とはだれのことであるか」と。

男とはこの「私」のことです。

遠い国へ行くとは、死ぬことです。

第一夫人とは私の肉体のことです。

“Vi tre afable zorgis pri mi. Pro tio mi dankas vin. Sed mi neniel volas iri al tiel malproksima lando.”

La viro ne havis alian rimedon ol turni sin al la dua edzino. Sed ankaŭ ŝi sen ĉagreno rifuzis lian peton kaj diris, “Mi ne povas akcepti tion, kion via plej amata edzino rifuzis.”

La viro treege seniluziiĝis kaj aliris al la tria edzino. Ŝi diris, “Nu, mi estas preta akompani vin ĝis la landolimo. Sed bonvolu permesi min adiaŭi vin tie. Mi ne volas plu iri.” Ankaŭ ŝi ne deziris akompani lin.

La viro estis tute senhelpa. Do li diris la samon ankaŭ al la kvara edzino sen granda espero. Tiam ŝi respondis, “Mi estadis ĉiam kun vi, post kiam mi forlasis miajn gepatrojn. Tial mi akompanu vin ĝis ĉiu ajn loko.” Tiu ĉi respondo kaŭzis, ke profunda pento atakis lin. Li diris en sia koro: “Mi devintus pli zorge rilati al tiu ĉi virino, kiu tiel kare amis min.”

Rakontinte ĉi tiel, Ŝakja-munio dimandis. “Kiu estas tiu ĉi viro? Kie troviĝas tiu malproksima lando? Kaj kiu estas la unua edzino, la dua edzino, la tria edzino, kaj la kvara edzino respektive?”

La viro estas neniuj aliaj ol mi mem.

Iri al malproksima lando signifas morton.

La unua edzino signifas mian korpon. Ĝi, kiun mi ĉiam ame zorgis kaj eĉ foje dorlotis, devas forlasi min

いつも可愛がって甘やかしていた肉体という妻は、死を境にして別れねばなりません。

第二夫人の美人とは財産です。確かにお金は魅力的です。しかしやはり、死後の世界にまで連れて行くことはできません。

第三夫人とは家族や親族のことです。生きている時はお互いに親しみ、離れがたい間柄です。しかし死んだ時は墓場までは見送ってくれるものの、一緒に墓へは入ってくれません。

第四夫人とは、私の「業」です。「親元を離れてあなたに嫁いで以来」とは物心ついて以来、ということです。「業」とは、私が心で思ったこと（意業）、話したこと（口業）、そして身体的活動（身業）の三者、およびその影響力のことです。物事にはすべてその原因があると、仏教では教えています（縁起）が、これを逆にいえば、私たちがなす行いには必ず結果を伴います。それは私の命が終った後にも、ずっと連鎖して残って行くものです。ですから、私たちは自分の業に責任を持って、注意深く発言し行動せねばなりません。

「無常忽ちにいたるときは国王大臣親昵従僕妻子珍宝たすく無し、唯独り黄泉に趣くのみなり。己に随い行くは只是れ善悪業等ののみなり。」

（道元『正法眼蔵』）

okaze de mia morto.

La dua bela edzino signifas mian riĉaĵon. Certe mono estas alloga. Sed ĝin mi ne povas porti ĝis la postmorta mondo.

La tria edzino signifas mian familion aŭ parencon. Dum mi vivas, mi kaj miaj familianoj aŭ parencaĵoj havis intiman kaj nedisigeblan rilaton. Kiam mi mortas, ili venas al tombejo por adiaŭi, sed neniam bonvolas eniri en tembejon.

La kvara edzino signifas mian karmon. “post kiam mi forlasis miajn gepatrojn” signifas “post kiam mia koro establiĝis.” “Karmo” havas la tri kategoriojn: ago per korpo, parolo per buŝo, kaj penso en koro. Ĝi ankaŭ implicas iliajn sekvojn kaj influojn. Laŭ la budhisma ideo pri laŭkondiĉa estiĝo, ĉiuj aĵoj havas siajn kaŭzojn. Se diri tion de la inversa direkto, niaj agoj nepre naskas rezultojn. Ili siavice naskas aliajn rezultojn, kaj tiamaniere daŭras la ĉeno de kaŭzo kaj rezulto, ankaŭ postmorte. Tial ni respondecas pri nia propra karmo kaj devas paroli kaj agi atente.

“Kiam vi devas morti, ne helpas vin eĉ reĝo, ministro, amiko, servanto, familiano aŭ viaj riĉaĵoj. Vi absolute sola devas iri al nekonata loko. Tiam vin akompanas viaj bonaj aŭ malbonaj karmoj solaj.”

(Dôgen: *Trezorejo de Dharma Okulo*)